

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

8 DECEMBRO 1978
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

LKK 80 raportas

La unua ĉijara numero de *La Espero* komenciĝis per informo, ke la estraro de UEA decidis, ke la Universala Kongreso de Esperanto 1980 okazu en Stokholmo. Kio okazis depost tio?

La LKK dum la tuta jaro regule kunsidis, proksimume ĉiun monaton. La demandoj, kiujn ĝi diskutis, temis plejparte pri planado, kontaktoj kaj loĝado.

La lokaloj por la kongreso jam estis rezervitaj, sed necesis pli detale kontroli ilian taŭgecon por la diversaj bezonoj. Kiel vi jam scias, la inaŭguro okazos en la Koncerta domo de Stokholmo, dum ĉiuj aliaj programeroj okazos en la Popoldomo kaj la lernejo Norra Latin. Ili ĉiuj situas tute centre en la urbo.

La centro de Stokholmo havas sufiĉe multe da hoteloj. La LKK petis rezervigon de 1 200 litoj en ili, en diversaj prezkatégorioj. Krom tio Gun Gerdman, kiu respondecas pri loĝado, serĉadis pli malmultekostajn loĝeblcojn (la stokholmaj hoteloj ne apartenas al la plej malmultekostaj) kaj sukcesis eltrovi kelkcent da ili: jen dek litoj, jen tridek, ofte por tre favoraj prezoj. Sed kelkaj situas iom ekster la urbo, do ĉiam restas iu malavantaĝo; sed ne ĉiuj.

La LKK ankaŭ faris kelkajn kontaktojn: kun la eduka ministrejo pri subvencio, kun la ŝtata turisma komisiono pri afiŝoj, broŝuroj kaj filmoj, kun SL pri enurbaj vojaĝoj, kun Ruĝa kruco pri infana kongreseto k. a. La laboroj sur tiu kampo ankoraŭ daŭras, kompreneble. Rilate al infana kongreseto eblas diri ke estas rezervita «infanvi-



laĝo» de Ruĝa kruco, kie LKK planas kongreseton por 50 infanoj. Ĝi situas en Västerhaninge, sude de Stokholmo.

La kongresa insigno jam estas preta; vi povas vidi ĝin ĉi-apude. Ĝi enhavas la turon de la urbodomo kiel simbolon, tutsame kiel la insigno de la UK '34. Jen tradicio, kiu ripetigas.

La konata verkisto Per Anders Fogelström akceptis esti membro de la honora komitato.

La programo de la kongreso estas ankoraŭ granda demando-punkto. Pluraj eroj estis diskutataj; tutcerte la programaro sekvos la modelon de la aliaj universalaj kongresoj. Unu eron la estraro de UEA jam fiksas: okazigon de seminario pri lingvaj minoritatoj. La plej malfacila tasko ŝajne estos la teatra vespero, ĉar la LKK ne estas kontenta kun la ĝisnunaj proponoj.

En sia lasta kunsido, en decembro, la LKK jam devis decidi pri kotizoj — unu kaj duonan jaron antaŭ la kongreso! Ilin la estraro de UEA unue devas pritrakti; do ili restu sekretaj ankoraŭ dum kelkaj monatoj.

LKK cetere jam interesiĝas pri volontuloj, kiuj pretos kunhelpi antaŭ kaj, ĉefe, dum la kongreso. Kelkaj jam anoncis sin, sed LKK volonte akceptus pli da sinanoncoj. La adreso de LKK estas: 65a Universala Kongreso de Esperanto, Box 4009, 122 04 Enskede. La telefonnumero estas tiu de Sven kaj Kerstin Alexandersson: 08-49 80 24. Ankaŭ poŝtgira numero jam ekzistas: 4 31 79 92 - 8, se vi bezonas ĝin pro iu kaŭzo.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen: Sven
Alexandersson, Åke
Blomberg, Anita Lindblom,
Geoffrey Sutton
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12 - 3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, maj, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1978

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Högerv. 31,
(T-station Talkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12 - 3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
utan tidning 15 kronor
Prenumerationsavgift för *La
Espero* och *Esperantonytt*
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack,
200 42 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppettider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Ströme
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg

Mycket esperanto i detta nummer

Det finns mycket esperanto i detta nummer av *La Espero*. Du hittar faktiskt svenska bara på denna sida och i annonserna. Det är gjort med avsikt. Under december har du fler lediga dagar än annars, så du kanske vill läsa lite mera esperanto än i vanliga fall.

På sidan 62 hittar du något som *La Espero* sällan har: översättning ur en roman. Det är *Röde Orm* av Frans G. Bengtsson, översatt av Bertil Nilsson; det är prosaöversättningen som fick första pris vid årets översättningstävling.

Vi kan fö nämna, att det blir en liknande tävling även nästa år — så varför inte använda helgen till ett försök att vara med?

På sista sidan hittar du fortsättningen på *Ne sekvu konsiljojn!* av Jerome K. Jerome, påbörjad i nr 7. Det är ett mindre seriöst stycke av författaren till *Tre män i en båt* m m.

Trevlig läsning och en trevlig helg åt er alla!

Två tidningar för de yngsta

Eftersom SEJUs bulletin *ktp* är till för lite äldre medlemmar, har SEJU beslutat att skicka till de yngre två publikationer ägnade åt dem: *Kalejdoskopo* till de yngsta och *Juna amiko* till de lite äldre.

Ifall dina barn som är med i SEJU inte får någon av dessa tidningar nästa år, hör av dig till SEJU, Box 4009, 122 04 Enskede.

La Espero med rabatt

Även nästa år kan du gåvoprenumerera på *La Espero* med 50% rabatt.

Om du redan har *La Espero*, antingen som medlem eller som prenumerant, kan du ge bort en gåvoprenumeration för 20 kr för 1979.

Du kan få denna rabatt om du vill ge *La Espero* till dina bekanta utomlands eller till olika 'instanser' i Sverige (väntesalar, läkarmottagningar, frisörssalonger o dyl).

När det gäller bibliotek för-

JES & NE

sök att i första hand övertyga dem att själva prenumerera, till hel avgift, förstås. Fr o m i år är *La Espero* med på Bibliotekstjänsts prenumerationslista, så det är extra enkelt för biblioteken att prenumerera.

Det enda du inte kan göra med denna rabatt är att prenumerera för en privatperson i Sverige.

Beställ Luzern- brevmärken!



Och så var det dags igen att beställa vackra brevmärken åt dina brev. Världskongressen i Luzern har just gett ut sådana i tre färger.

Du beställer enkelt genom att betala till pg. 14 74 29-5, (Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö) och skriva på talongen vad betalningen gäller. Ett blad med 10 märken kostar 2,75, 3 blad får du för 5,50.

Beställ med detsamma!

Många nya i Klubo Cent

Vi kan denna gång redovisa en lång lista med medlemmar som kommit med i *Klubo Cent*. Här är den:

Isidor Söderman, Sala
Ingemar Nordin, Årjäng
Sune Ahlm, Vänersborg
Martha Colliander, Täby
Gunnel Ek-Thorborg, Sthlm
Karl Gustafsson, Bergvik
Rolf Nordström, Huskvarna
Sven Alexandersson, Enskede
Henrik Karlsson, Kisa
Anna Ericson, Sundsvall
Gunnar Börjesson, Göteborg
Ragnar Hjorth, Stockholm
Gösta Persson, Helsingborg
Paul Almén, Hällefors
Oscar Eklund, Helsingborg
Jens Johansen, Degerfors
Estrid Lind, Krylbo
Birger Viggen, Järfälla
Louise Karlsson med make
«Esperanto-Kalle», Nynäshamn
K.E. Bergström, Arboga
Carl Jönsson, Höllviksnäs
Hans Petersson, Lund
Alingsås Esperantoklubb

Milorad Ljubisavljević, Älta
Bengt Nordlöf, Tyresö
Mary Asplund, Härnösand
Tore Johansson, Kalmar
Erik Lundvall, Borlänge
Sigurd Olsson, Strömnäsbruk
Henry Almar, Uddevalla
Leif Holmlund, Skellefteå
Ragnar Elofsson, Örebro
Stig Carlsson, Malmö
David Sandström, Malmö
Elna Jansson, Trångsund
Adolf Vestman, Björna
Kurt Frisk, Västerås.

Listan är aktuell den sista november. De vars «medlemsavgift» kommit i december eller senare kommer att redovisas i nästa nummer.

Till alla vill SEF tacka hjärtligt.

Vardagsesperanto på annat håll

Vår serie *ĈIUTAGA ESPERANTO* fortsätter och handlar denna gång om bakning. Men även på annat håll kan du hitta nyttiga uttryck. I nr 3 av *Esperantonytt* finns en lista med ord som återkommer i kärnkraftsdebatten. Bra att kunna om man ska resonera om den med sina brevvänner!

Men även *ktp*, SEJUs medlemsblad, har börjat med «vardagsesperanto». I senaste numret förklarar man hur olika detaljer på en kamera heter. Även det nyttigt!

Ett nyhetsmagasin på esperanto?

La Espero har under några månader haft annonser för en ny tidskrift med namnet *Semajno*. *Semajno* är planerad att utkomma fr o m nästa år varje vecka på 40 sidor i A4. Provnymret, som recenserades i nr 5 av *La Espero*, visar vad *Semajno* är tänkt att bli: ett internationellt nyhetsmagasin.

Det är fråga om ett oerhört ambitiöst projekt, med tanke på att något liknande saknas på svenska. Om projektet blir av, alltså om det till slut blir någon *Semajno* eller inte, beror bara på oss esperantister, faktiskt på oss esperantister i Västvärlden.

För att *Semajno* ska komma ut behöver den prenumeranter. Eftersom det är fråga om en veckotidning, blir prenumerationen nödvändigtvis ganska dyr — 150 DM för ett år. Jäm-

för med vad en svensk veckotidning, som kommer ut i hundratusentals exemplar, kostar; *Semajno* är egentligen inte dyr.

Men *Semajno* behöver prenumeranter för att börja utkomma. För att bli prenumerant behöver du bara skriva ett kort med följande lydelse:



«Mi abonas al *Semajno* por la daŭro de unu jaro. Mi pagos la abonkotizon tuj post la ricevo de la unua regula numero.» Skicka kortet med din adress till *Semajno*, Stefan Maul, Singerstr. 1/III, D-8900 Augsburg, FR Tyskland, så att han har det före årets slut. Skicka inga pengar. Du betalar *efter* att ha fått nr 1 av tidningen.

Har du missat att beställa nr 0? Du kan förmodligen fortfarande göra det genom Esperantoförbundet. Men hur som helst, skicka ett kort med din prenumerationsanmälan!

SEJU en Bredsand: kantante antaŭen

Jes, ni multe kantis dum la semajnfino de SEJU en Bredsand. Tie, en junulargastejo apud Enköping, dum la dua semajnfino de novembro renkontiĝis aro da gejunuloj, vere junaj, kaj spirite junaj. Estis dek sep partoprenantoj, tri akordionoj, unu violono, unu gitaro, sep gepatraj lingvoj. La renkontiĝo estis malfermita ne nur al delongaj movadistoj, sed ankaŭ al komenkantoj kaj komenkontoj. Oni krokodilis svede, germane kaj pole. Por krokodili rumane

mankis partnero. Kelkaj kantis ruse. Tiom pri «kantante».

Nun pri «antaŭen». Antaŭen ni puŝis la esperantomovadon, trudante pli ol mil *Esperantonj* al butikumantaj enĉepinganoj aŭ al la panelviŝiloj de iliaj aŭtoj. Ekipitaj per magnetofono kelkaj intervjuis la sendependajn surplaculojn pri esperanto, ne por dissendi per Pola Radio, sed por havi pretekston paroli pri esperanto. La savarmeo ankaŭ staris sur la placo. La vesterosa klubo starigis sian ekspozicion en kvieta angulo de memserva vendejo, kaj kelkajn persvadistojn apude. *Enköpingsposten* poste artikolis pri la renkontiĝo.

Ankaŭ alie ni antaŭeniĝis, unue promenante tra la bela ĉelaga ĉirkaŭaĵo de la junulargastejo, due ŝvitante en lingvokursoj, unu por la freŝbakitaj komencantoj, unu por progresemuloj, kiuj devis traduki en kaj el la krokodilaj lingvoj. Ho jes, ni ankaŭ komune kuiris, bakis, pantranĉis, telerlavis kaj manĝis.

Ĉu ripetinda? Nepre. Por allogi ankoraŭ pli da membroj loĝantaj for de la potencentro de SEJU, oni decidis esplori la eblecojn okazigi printempan semajnfino en la regiono de Skövde. Kaj eĉ pli alten flugis la planoj: serioze esploratas kiel aranĝi esperantistan migrosemajnon en la montaro. Jam nun aĉetu taŭgajn botojn kaj kutimiĝu al ili!

Klaus Schubert

Niajn gratulojn al Roland Dupuis

Jen novaĵo, kia ne ofte aperas en *La Espero*: nia konata **Roland Dupuis** estis en ceremonio ĉe la franca ambasado fine de novembro honorigita kiel Ĉevaliro de artoj kaj literaturo.

Niajn gratulojn!



Jen preskaŭ ĉiuj partoprenintoj en Bredsand. Vi povas vidi, ke temis pri vere «juna» junulara aranĝo. Fotis Milorad, kiu ne estas sur la foto.

HODIAŬ

Broŝuro de antaŭ kvin jaroj restas daŭre aktuala

Antaŭ kvin jaroj SEF aperigis broŝuron, per kiu ĝi memorigis pri la 25-jara jubileo de la akcepto de la Deklaracio pri la homaj rajtoj. Ĉi-jare ni povas festi la 30-jaran jubileon kaj konstati, ke tiuj homaj rajtoj por multaj restas revo.

Io ŝanĝiĝis dum la lastaj kvin jaroj. Iuj landoj reakiris kelkajn demokratiajn rajtojn — dum aliaj perdis ilin. Estas malfacile diri, ĉu la situacio entute estas pli bona.

Mi kredas, ke iom pliboniĝis la situacio sur la lingva kampo. En Svedio oni hodiaŭ akceptas la rajton de la enmigrintoj konservi kaj evolui siajn lingvon kaj kulturon en maniero apenaŭ pensebla antaŭ kvin jaroj. En Hispanio, kiun SEF antaŭ kvin jaroj prenis kiel ekzemplon pri lingve diskriminacia lando, la katalanoj kaj baskoj ricevis la rajton uzi siajn lingvojn. Sed ĝuste dum mi skribas tion ĉi aŭdiĝas el la radio raporto, ke la baskoj malakceptis la novan konstitucion de Hispanio. La raportisto aldonas, ke ili ne faris tion pro sia kontraŭo al ĝi (ĝi tamen estas pli bona ol la antaŭa), sed ĉar ĝi ne donas al ili la rajtojn, kiujn ili postulas. Ankaŭ lingvajn rajtojn.


«Lingvo ludas gravan rolon en la vivo de la homoj. Lingvoegaleco estas grava demando», estis nia konkludo antaŭ kvin jaroj — kaj same ni povus konkludi nun.

Ankoraŭ io ŝanĝiĝis. La konscio pri la rolo de lingvo estas pli klara ol antaŭ kvin jaroj. En la internaciaj organizaĵoj pliakriĝis la lingva situacio kaj akcentiĝis la problemoj. Esperanto estas propono diskutata en ili, eĉ se ĝi ne estas ankoraŭ akceptebla. Ni havas kaŭzon esti optimistaj, plilabori, eble eĉ trudi nian solvon. Ni scias, ke ĝi estas realisma, simpla, la sola vere demokratia. Ni citu el tiu nia broŝuro, kia ĝi estu:

«Ni proponas akcepton de solvo laŭ la jenaj principoj:

1 Ĉiuj principe rezignas je uzo de sia propra lingvo en rilatoj kun aliaj popoloj.

2 La internacia lingvo esperanto fariĝu la dua lingvo por ĉiuj, la komuna lingvo por internacia uzo kaj signo de aparteneco al pli vasta homa komunumo.»



Franko Luin

Tre granda sukceso por la «tagoj de Jönköping»

Nova tendenco, entuziasmo, volo kaj fido — jen kio manifestiĝis en la bonega semajnfina konferenco, kiun Sveda Esperanto-Federacio iniciatis kaj kiun realigis Klubo Esperantista de Jönköping la 17 — 19 de novembro en Popola Altlernejo de Södra Vätterbygden. Kvindek kvin partoprenantoj el 32 lokoj signas novan freŝan venton inter la esperantistaro de Svedio. Ĉu tiuj fervoraj geamikoj nun estas kontentaj? Ne, tute ne! Ili ĉiuj atendas novan, baldaŭan kaj nepre necesan daŭrigan en formo de pli speciala kurso/seminario, kiu ankaŭ povus ebligi al ankoraŭ pli da novaj fervoruloj prepari sin por estontaj taskoj.

En nia movado, en Svedio ne malpli ol en aliaj partoj de la mondo, jam de longe montriĝis manko de la esenca kunlaborantaro: informantoj, organizantoj, kursgvidantoj/instruistoj kaj interpretistoj. Kiam oni en la estraro de SEF atendis 15—20 partoprenantojn, la reala bezono mem kaŭzis aliĝon de trioble pli granda nombro. Multaj spitis la longajn distancojn kaj alvenis de Kramfors norde ĝis Malmö sude.

Ne pensu, ke kolektiĝis seriozmienaj gravuloj. Verdire ne! Gajaj humorplenaj, kritikemaj kaj senkaŝe sinceraj geamikoj, tamen plene konsciaj pri la laborplenaj taskoj laboris kune, diskutis, disputis, sed tamen ... plenary harmonie kunlaboris por atingi bonan rezulton.

Pripensu, ke nur kvin personoj faris la pezan laboron de organizado kaj gvidado de la tuto: Karl Buremo kaj Jack Snarberg, organizantoj, Ingrid Bergrentz, Anna-Maria Lange kaj Lennart Svensson, studgvidantoj. Sed tiu mirinda kvino bonege sukcesis!

La centra programo, t e la instruado al la estontaj kursgvidantoj, prezentis taskojn diversgradajn al la partoprenantoj. Komence oni ekzamenis la ĝeneralan konon pri gramatiko, kiu ja estas kaj restas tiu mortero, kiu kunigas la brikojn de la lingvo, la vortelementojn. Montriĝis, ke la partoprenantoj bone regas tiun parton de la lingva instruado. Ili eĉ miriĝis la fakan instruistino, Ingrid Bergrentz, kiu — neesperantistino — konstatis la eksterordinarajn

talentojn de la esperantistoj. (Nuntempe la kono de la gramatiko fundamenta vere tre lamas inter la svedaj lernantoj).

En intensa gruplaboro (kvin grupoj) okazis profunda enpenetro en tiujn elementojn, kiujn devas regi bona instruisto de esperanto. Kontrolo, diskuto kaj pli vasta ekzamenado okazis, kiam la grupoj kolektiĝis por raporti pri siaj atingoj. Kritiko ne mankis, sed ĉiam montriĝis sincera, amikeca, esence instrua!

Inter la prelegistoj estis instruistaro Lars-Ola Sundberg el Kleriga Asocio de Liberaj Eklezioj (Frikyrkliga Studieförbundet). S-ro Sundberg tre klare kaj lerte prezentis diversajn favorojn kaj faciligojn, kiujn ankaŭ ni esperantistoj rajtas senrezerve ĝui en nia popolkleriga laboro (kursoj, seminarioj,

prelegoj ktp). Lia prelego kaj liaj multaj respondoj al la scivolaj kursanoj estis konstateble tre aprezataj. Li rakontis pri la validaj regularoj, pri pluraj eksterordinaraj favoroj dank' al la malavara subteno flanke de la sveda ŝtato kaj guberniaj parlamentoj (landsting), ofte ankaŭ de unuopaj komunumoj. Ekzemple: tutlandaj kursoj, mallongaj kursoj de karaktero popole altlernejaj, mallongaj kursoj por eduki funkciulojn, unutagaj, du-tagaj kaj plurtagaj kursoj, kombinita studronda laboro en popolaj altlernejoj kaj — sendube la plej aktuala — la nuntempa regularo pri subteno al ordinara (sezonaj) kursoj/studrondoj. Pri tio ĉi kaj multe pli ni partoprenantoj informiĝis (ekzemple ankaŭ pri la rajto alvoki ĝis 4—5 foje «fakulojn» al niaj studrondoj kaj pagi al ili certan honoraron). Entute, ni konstatis, ke ni — esperantistaro — estas tre dorlotitaj en Svedio. Nur dependas de nia volo eluzi, akcepti kaj ĝui ĉiujn avantaĝojn.

La «tagoj de Jönköping» estis eksperimento, verŝajne la unua en serio de similaj aranĝoj, certe paŝon post paŝo pli kaj pli

efikaj, rezultodonaj. Nun ni scias, kiel aranĝi, kiel plibonigi kaj efektive utiligi tiaspecajn semajnofinajn kursojn, kiuj cetero estas tre malmultekostaj por la partoprenantoj.


La etoso de kamaradeco kaj sincera komuneco montriĝis per la fakto, ke ĉiu unuopa kursano estis tre forte kaj plene engaĝita daŭre de la tuta kunestado. La evidenta tendenco de marŝado supren nun devas esti bone observata. Kial ne nova konferenco en frua printempa monato 1979?

Distra vespero enhavis varian programon. En la granda fest-salono okazis bazono, kie oni povis aĉeti literaturon, lernolibrojn de esperanto, sed ankaŭ elekto inter tre ĉarmaj, ekzotikaj objektoj el nia mondo. Tiuj objektoj estis vendataj favore al evolulanda helpo. Ni ankaŭ aŭskultis pri la preparoj rilate la UK de Stokholmo 1980 (parolis Birger Viggen kaj Gun Gerdman el la 65a LKK), Maud Pelz bele kaj varmvoĉe prezentis kantojn kaj recitis poemojn en esperanto kaj en sveda, Lennart Åberg raportis pri unumonata turneo de la itala monaĥo pastro Albino Ciccanti. Fine doktoro Zamiro, nia lerta magiisto, ĝojigis la publikon kaj alvokis plurajn junajn spektantojn partopreni en la mirigaj eksperimentoj. Ĉe la vespera kafo Karl Gustafsson rakontis pri siaj spertoj en CO de UEA dum monata Volontula Servo, kiun lia edzino kaj li faris en Rotterdam.

Ĉu nenia kritiko el vidpunkto negativa? Preskaŭ ne, se oni preterlasas la fakton, ke ni esperantistoj — nun kiel ĉiam — provas konvinki nin reciproke pri la utilo, valoro, nesuperebleco de esperanto ... Eĉ Lennart Åberg falis en tiun 'sulkon' dum la diskutado. Cetero la diskutoj ampleksis i a kiel gvidi kurson de komencantoj, kiel oni restigas la komencantojn tra la tuta kurstempo, kiun materialon ni disponas ĝuste nun por niaj kursoj, pri diskoj-kasetoj pri modela prononado, kiel fine trovi lernolibron por infanoj, kiel organizi kursojn kaj seminariojn kiel tiun ĉi ktp, ktp.

Kiu meritas dankon? Antaŭ ĉiuj la kuraĝaj «smolandanoj», kiuj prenis sur sin la taskon de organizado. Ni dankas ankaŭ la kursgvidantojn, kiuj lerte kaj sindone laboradis tra la tuta kurso. Ni dankas la administracion de la Popola Altlernejo, kiu afable, malavare kaj amike faris ĉion por faciligi nian restadon kaj solvis aron da praktikaj problemoj.

Ni volonte revenos ...



Du bildoj por dokumenti la kurson en Jönköping. Sur la supra kelkaj partoprenantoj atente aŭskultas ies prelegon, sur la suba i a kelkaj lokanoj «pozas» por la fotografiisto.

Antaŭ kristnasko ni lernas pri bakado

Ni daŭrigas la serion *ĈIUTAGA ESPERANTO*, kiu ĉifoje temas pri bakado.

Por multaj bakado ne estas ĉiutagaĵo, sed sezonaĵo. En plej multaj hejmoj oni bakas antaŭ kristnasko, eĉ se bakado ne okazas dum la resto de la jaro. Sed kio pri la vortprovizo? Kiel nomi la objektojn kaj ilojn uzatajn? Ni baku!

Unue iom da pano, ekzemple pandiskoj.


Recepto

2 1/2 dl da lakto
2 1/2 dl da akvo
50 g da fermentaĵo
100 g da butero aŭ margarino
1/2 tekulero da salo
1/2 dl da sukero
1 tekulero da aniso
1 tekulero da fenkolo
1 tekulero da kumino
10 — 12 dl da kribrita sekalfaruno

Oni miksa la sekajn ingrediencojn en pelvo per ligna aŭ plasta kulerego. La fermentaĵon oni fandigas en tepida akvo. Poste oni enverŝas la likvaĵon kaj prilaboras la paston ĝis ĝi fariĝas glata. Oni kovras la pelvon per tuko kaj lasas la paston fermenti dum duona horo.

Dumtempe oni grasumas du bakplatojn per oleo aŭ margarino, kovras la baktabulon per faruno kaj alportas la rulilon. Kiam la pasto estas bone fermentita, oni knedas ĝin kaj dividas en kvar pecoj. La pecojn oni platigas per la rulilo ĝis dikeco de 1 — 1 1/2 cm. La pandiskojn oni pikas per forko kaj lasas ilin fermenti dum ankoraŭ duonhoro.

Oni penikas la pandiskojn per varma akvo kun kelkaj gutoj da oleo kaj poste metas ilin en fornon je 225°C. Tempo en la forno: 12 ĝis 15 minutoj.




Kaj nun tempo por kuko. Ni faros bongustan ĉokoladkukon.

Recepto

2 ovoj
2 dl da sukero
1 supkulero da vanila pulvoro
2 supkuleroj da kakao
1 1/2 dl da bakpulvoro
2 dl da faruno
100 g da butero
1 dl da akvo

La ovojn kaj la sukeron oni batas ĝis ŝvelo uzante ordinaran aŭ elektran kirlilon. Oni miksa vanilan pulvoron, kakaon kaj bakpulvoron kun la faruno en pelvo. Poste oni fandigas la buteron en malgranda kaserolo, almetas la akvon kaj boligas la miksajon. Nun oni almetas la farunan miksajon al la ovopasto kaj poste la bolantan butero-akvo-miksajon dum kirlado de la pasto.



La paston oni verŝas en rondan formujon, kiun oni grasumis kaj surŝutis per paneroj. La bakforna temperaturo estu 200°C kaj la kuko restu en la forno 30 minutojn.

Anita Lindblom

NYUPPACKAT!

TRA DEZERTO KAJ PRAARBARO av Nobelpristagaren Henryk Sienkiewicz. 316 sidor. Översättning M. Sygnarski. Berömd äventyrsroman om två europeiska barns flykt genom Egypten och Sudan under religionskriget på general Gordons tid. Vackert, starkt plastband. Pris med moms **78,50**

SLOVAKA ANTOLOGIO, sammanställt av Jozef Vilky. 538 sidor. Brett och populärt urval ur 85 författares verk, från det 9e århundradet till i dag. Inbundet och välgjort band. Pris med moms **80,—**

ESPERANTO — LINGVO MOVADO INSTRUADO red. Detlev Blanke. 187 sidor. Antologi bl a för högre studier i de i titeln nämnda ämnena. Ur innehållet: Planlingvaj projektoj; La lingvo esperanto; Movado; av kända esperantister. Häftad. Pris med moms **35,—**

Vi sänder beställda böcker så snart vi får påfyllning, om de tillfälligt skulle ha tagit slut.

ESPERANTOFÖRLAGET, FACK, 200 42 MALMÖ

Kristnaska nuksokuko

Antaŭ ĉiu kristnasko mi preparas nuksokukon, kiu estas tradicia en mia hejmregiono. Oni unue preparas la paston. Por ĝi estas bezonata:

100 g da butero
100 g da sukero
3 ovoflavoj
1 l da faruno
1/4 l da lakto
1/2 supkulero da salo
50 g da fermentaĵo
gratita citronŝelo

Miksu en pelvo la buteron, sukeron, ovoflavojn kaj citronŝelon ĝis kiam ili fariĝis kremecaj. Aldonu iom post iom farunon, lakton, fermentaĵon (kiun vi preparis pli frue) kaj salon. Miksu bone. Lasu fermenti dum duona horo.

Dume vi preparas la nuksofarĉon. La nuksoj, kiujn vi uzos, povas esti juglandoj, migdaloj kaj avejoj — iom da ĉiuj aŭ nur unu el ili. Plej bongustan kukon vi ricevos, se vi uzos nur juglandojn, sed ĝi ankaŭ kostos pli. Por la farĉo vi bezonas la jenon:

1/4 kg da sukero
70 g da butero
3 ovoflavoj
iom da gratita citronŝelo,
cinamo kaj kariofilo
4 kuleroj da grasa kremo
1/2 kg da muelitaj nuksoj
100 g da gratita ĉokolado
ŝaŭmo de 2 ovoblankoj

Miksu en pelvo la buteron, sukeron, ovoflavojn kaj spicojn ĝis kiam ili fariĝas kremecaj. Aldonu la nuksojn, ĉokoladon, kremen kaj ovoblankojn, kaj bone miksu la tuton. Se vi preferas, vi povas, anstataŭ la kremo, uzi saman kvanton da deserta vino (ŝereo, vermuto aŭ portvino); tio donos alian aromon al la kuko.

Se duonhoro jam pasis, prenu la fermentitan paston, knedu ĝin bone kaj platigu ĝin per rulilo. Zorgu, ke la plata pasto havu kiel eble plej kvarangulan formon. Kovru ĝin per la nuksofarĉo, egale super la tuta surfaco, kunvolu ĝin kaj metu ĝin sur farumitan bakplaton. Se ĝi estas tro granda, donu al ĝi la formon de litero U. Zorgu, ke ĉiuj flankoj estu bone 'fermitaj'. Ŝmiru la tutan surfacon de la kuko per la restinta ovoblanko. Lasu fermenti dum 45 minutoj. Baku dum horo — horo kaj kvarono en duonvarma forno (175°C).

Vi rimarkos, ke la kuko estas sufiĉe 'peza', kaj ke ne eblas manĝi grandajn kvantojn po fojo. Sed ĝi bone tenas sin kaj eĉ post du semajnoj vi povos ĝui ĝin.

Franko Luin

Ruĝa Orm

de Frans G. Bengtsson
Tradukis Bertil Nilsson

UNUA ĈAPITRO

Ĉe la bordo la popolo loĝis en vilaĝoj, pro pli facila sinu-trado kaj por plia sekureco; ĉar ofte provis albordegojn ŝipanoj, kiuj ĉirkaŭvelis Skanion, kaj en la printempo, kiam forirante ili volis sin provizi per malmultpreza freŝa manĝo, kaj en la aŭtuno, kiam kun manoj malplenaj ili revenis de ekspedicioj sensukcesaj. Kornojn oni blovis en la nokto, kiam oni rimarkis albordegojn aron, kaj vokis najbarojn por helpo; kaj kelkfoje hejmaj homoj en bona vilaĝo povis mem preni unu aŭ du ŝipojn de fremduloj nesingardaj, kaj posedi belan predon por montri al forestintoj de la vilaĝo, kiam la longŝipoj venis hejmen por vintra ripozo.

Sed al riĉaj kaj fieraj viroj, kiuj posedis propran ŝipon, estis ĝene havi najbarojn proksime al si kaj ili preferis loĝi izole; ĉar eĉ estante sur la maro ili difendigos siajn bienojn per bonaj viroj hejme restantaj. En la regiono de Kullen troviĝis multaj tiaj grandbienuloj; al la riĉaj kamparanoj tie gluiĝis la famo, ke ili estas pli fieraj ol tiuj en aliaj lokoj. Estante hejme ili volonte kverelis inter si, malgraŭ tio, ke estis vasta spaco inter la bienoj; sed ili ofte forestis, ĉar de infaneco ili rigardadis super la maron kaj ĉiu el ili ĝin konsideris sia propra paŝtojo, kie ĉiuj, kiujn li renkontis, kulpas mem pro tiu malbonsanco.

Loĝis tie bienulo nomata Toste, viro de bona reputacio kaj granda marveturanto; malgraŭ tio, ke li estis ne pli juna, li daŭre kondukis sian ŝipon kaj iris eksterlandon ĉiun somerojn; li havis parencojn en Limerick sur Irlando, inter la vikingoj ekloĝintaj tie, kaj li kutimis iri tien por komerci kaj por helpi al la ĉefo, kiu estis de la sango de Lodbrok, preni imposton de la ejoj kaj de iliaj monaĥejoj kaj preĝejoj. Nun la bonaj konjunkturoj por vikingoj sur Irlando jam komencis dekliniĝi, post kiam Muirkjartach kun la Ledo-manteloj, reĝo de Connacht, rondiris la insulon kun la ŝirmila flanko turnita kontraŭ la maro; ĉar nun la enloĝantoj sin defendis pli bone ol antaŭe kaj pli vole sekvis siajn reĝojn, tiel, ke kostis multe da peno kolekti imposton de ili; eĉ monaĥejoj kaj preĝejoj, kiujn oni pli frue facile prirabis, nun jam konstruis altajn turojn el ŝtonoj, kie la pastroj sin kaŝis kun siaj trezoroj kaj ne estis eble ilin atingi per fajro nek per armiloj. Tial multaj inter la viroj de Toste nun opiniis, ke estus pli bone direkti la vojaĝojn al Angllando aŭ Frankoregno, kie la cirkonstancoj estas pli bonaj kaj pli estus gajnebla per malpli da peno; sed Toste sentis sin pli komforta, kiam li agis laŭ sia kutimo, kaj li pensis, ke li estas tro maljuna por provi landojn, kie li sin ne sentas hejme.

Lia edzino nomiĝas Āsa kaj devenis el la regiono de la arbaroj. Ŝi havis senlaca langon kaj estis iom batalema laŭ humoro, kaj Toste foje diris, ke neniam antaŭsignon li povas rimarki de tio, ke ŝi mildiĝos kun la jaroj, kiel ordinare okazas al viroj; sed ŝi estis bona mastrino de domo kaj bone zorgis pri la bieno, kiam Toste forestadis. Ŝi jam naskis al li kvin filojn kaj tri filinojn, sed al la filoj bonŝanco ne estis. La unue naskita jam frue pereis dum festo de geedziĝo, kiam li, gaja pro biero, volis montri, ke li povas rajdi sur bovo; la post tiu naskitan la ondoj kaptis dum ŝtormo dum lia unua vojaĝo. Sed plej kruele la malbonsorto frapis la kvaran, kies nomo estis Are; ĉar en somero, kiam li havis dek naŭ jarojn li gravedigis la edzinojn de du najbaroj, dum

iliaj edzoj estis ekster lando kaj per tio kaŭzis grandan malordon kaj multan mokon, kaj ankaŭ grandajn elspezojn al Toste, kiam revenis la edzoj. Post tio li fariĝis melankolia kaj hontema antaŭ homoj kaj mortigis viron, kiu tro multe ŝercis pri lia braveco, kaj post tio fuĝis el la lando. Kuris la famo, ke li sin aligis al svedaj komercistoj kaj iris orienten kun ili por ne renkonti homojn, kiuj scias pri liaj ĉagrenoj; sed post tio oni nenion aŭdis pri li. Āsa songis pri nigra ĉevalo kun sango sur la ŝultroj kaj el tio ŝi sciis, ke li mortis.

Restis do post tio du filoj al Āsa kaj Toste. La pli maljuna nomiĝis Odd; li estis viro de malalta staturato kaj fortika kresko, kurbkrura kaj forta, malmolmana kaj pripensema antaŭ parolo. Frue li prenis parton en la vojaĝoj de Toste kaj havis lertan manon pri ŝipo kaj armiloj. Hejme lin baldaŭ ekregis malbona humoro, ĉar estis al li malfacile pasigi la vintrojn, kaj tiam ofte levigis kverelo inter li kaj Āsa. Li kutimis diri, ke li sen ŝangeblo estas tia, ke al li pli bongustas ranca sala manĝo sur la ŝipo ol rostaĵo ĉe la julo en la domo; sed Āsa diris, ke neniam ŝi rimarkis, ke li estis tiu, kiu prenis plej malmulton el la plej bono de tio, kion ŝi surtabligis. Ĉiun tagon li dormis tiom, ke li plendis, ke li malbone dormas en la noktoj; eĉ kiam li prenas servistinojn al si sur la litopajlon, li diris, ne tre pliboniĝas. Āsa malŝatis, ke li kuŝas kun ŝiaj servistinoj; facile ili el tio fariĝos trofieraj kaj arogantaj kontraŭ sia mastrino, kaj Odd prefere edziĝu. Sed Odd diris, ke tio ne urĝas; la virinojn, kun kiuj li sentis sin plej komforta, li trovis sur Irlando, kaj iun de tiu speco li ne bone povas venigi hejmen kun si; ĉar en tiu okazo, li povis supozi, ke inter ŝi kaj Āsa okazos batalo per bekoj kaj ungoj. Tiam Āsa incitiĝis kaj demandis, ĉu li tie sidas kaj deziras, ke ŝi mortu. Okazis, ke Odd respondis, ke en tiu afero ŝi agu tiel, kiel al ŝi ŝajnas pli bone: li ne volas doni al ŝi konsilojn en tiu afero, sed eltenos ion ajn, kio okazos.

Malgraŭ tio, ke li malrapide vortigis siajn pensojn, Āsa ne ĉiam venkis en la vortoluktoj kontraŭ li; ŝi kutimis diri, ke

severa estis la sorto kontraŭ ŝi, ke ŝi perdis tri bonajn filojn kaj restis nur tiu, kiun ŝi plej facile povus malhavi.

Pli bone akordis Odd kun Toste; tuj kiam venis la printempo kaj ekodoris gudro ĉirkaŭ boatejoj kaj pontoj, lia humoro malpeziĝis. Tiam li kelkfoje povis eĉ kunmeti kantojn, malgraŭ tio, ke tio estis malfacila por li; pri tio, kiel la kampo de la laro nun estas preta por plugado; aŭ kiel la ĉevaloj de la maro baldaŭ lin portos al la somerlando.

Sed grandan renomon kiel poeto li neniam gajnis, plej malmulte inter la edziniĝopretaj bienulfilinoj en la regiono. Malofte oni vidis lin returne rigardi, kiam li forvelis.

Lia frato estis la plej juna inter ĉiuj infanoj de Toste kaj okuljuvelo de lia patrino; lia nomo estis Orm. Li rapide kreskis kaj fariĝis alta kaj osteca, kaj Āsa multe lamentis pro lia malgraseco; tuj kiam li ne manĝis multe pli ol la plenkreskintoj, ŝi ĉiam kredis, ke ŝi lin perdos kaj diris, ke lia manĝmalemo kaŭzos lian pereon. Orm ŝatis manĝon kaj malfoste plendis pro la zorgoj de la patrino pri lia nutrado, sed Toste kaj Odd kelkfoje gruntis koncerne delikatajn pecojn, kiujn ŝi destinis al li. Kiel infano li kelkajn fojojn estis malsana; kaj poste Āsa neniam povis kredi, ke lia sano estas bona, sed konstante lin ĉirkaŭis per timo kaj admonoj kaj kelkfoje kaŭzis, ke li sin sentis plena de danĝeraj suferoj kaj en granda bezono de sakrita bulbo, magiaj kantoj kaj varmaj argilkruĉoj, kiam lian plej gravan malsanon kaŭzis tromanĝado de hordeokaĉo kaj lardo.

Kun lia kreskado la ĉagrenoj de Āsa plimultiĝis. Estis ŝia espero, ke li fariĝu rimarkinda homo kaj ĉefulo; ŝi ofte kun kontento diris al Toste ke li montras signojn, ke li fariĝos granda kaj forta kaj ke li jam estas tiel saĝa en siaj paroloj ke ŝajnas, ke en ĉio li heredis sian patrinon; sed ŝi estis plena de timo pro ĉiuj danĝeroj, kiuj lin renkontos sur la vojoj de viroj. Ofte ŝi parolis kun li pri la malbonsortoj de liaj fratoj kaj promesis lin, ke li evitu bovojn, estu singarda sur ŝipoj kaj neniam kuŝu kun edzinoj de aliaj viroj; sed krom tio multaj aliaj aferoj povus okazi al li kaj ŝi ne sciis kion fari

Malgranda asocio sur malgranda insulo

La esperantistoj sur Malto estas asociaj membroj de UEA ekde la Universala Kongreso en Bulgario. Tamen ne temas pri granda asocio, ĉar la 4-jara respubliko nur ampleksas 300 000 loĝantojn kaj la esperantosocieto havas 50 membrojn.

Antaŭ nia dua vizito al la insulo ni, tio estas Anita kaj mi, skribis al la delegito C. Mallia, kiu estas ankaŭ prezidanto de la societo. Responde li invitis nin partopreni en kluba renkontiĝo.

La unuan de novembro nia transportilo surteriĝis sur la kalkroka insulo. Se vi deziras imagon pri la areo, vi pensu pri insulo malpli granda ol la sveda insulo Orust. Arboj troviĝas, sed ne arbaroj.

La esperantosocieto havas propran ejon proksime de la parlamento ĉe «la strato de la respubliko». La nomo de tiu strato antaŭe estis Kingsway. Ankaŭ aliaj nomoj kun Queen kaj King estas ŝanĝitaj.

Ni estis petitaj viziti la klubejon kaj faris tion, kiam la estraro kaj komitato kunsidis por diskuti gravajn demandojn. La unua demando temis pri renkontiĝo dimanĉe kune kun flegistina societo. Ili diskutis pri programeroj pri vino ktp. La alia demando estis tre malkutima. Venis letero de la registaro, kiu diris, ke la societo devas ŝanĝi sian nomon, ĉar ili ne plu rajtas havi la nomon Malto en ĝi. Tio ĉi ne dependas de malamika sinteno al esperanto, sed

laŭ konjekto al tio, ke la registaro ŝanĝos la nomon de la respubliko. Aliaj societoj kaj firmoj ricevis saman admonon.

En la kunsido ili parolis en sia propra lingvo, la malta lingvo, kiu estas fundamente araba, sed tre influita de la itala kaj angla. Dum nia mallonga vizito ili estis tre afablaj diskuti pri siaj problemoj en esperanto. Kvar el la partoprenantoj estis junaj virinoj.

La «vin- kaj fromaĝ-festeno» okazis, kiel dirite, kune kun flegistina societo. Venis multaj personoj, ĉar oni venis familie. Krom ni du svedoj venis ankaŭ paro el Nederlando. Pro la partopreno de eksterlandaj gastoj la sekretario J. Vella-Bondin aranĝis tabulon sur la muro apud nia tablo kun svedaj kaj nederlandaj mapoj kaj flagoj.

Oni petis nin diri kelkajn vortojn pri Svedio. Pro la ĉeesto de la neesperantistaj flegistinoj okazis tradukado.

En la posta vespero ni estis invititaj viziti esperantistojn hejme. La maltanoj loĝas en relative grandaj apartamentoj. Novaj domoj troviĝas de multaj diversaj eksteraj formoj. La sekretario, kiu estas instruisto, posedas novan kaj tre belan domon. Ĉe la enirejo sur la muro ni legis la nomon de la domo — La Espero.

La maltanoj parolas sian propran nacian lingvon, sed la angla lingvo ankoraŭ restas tre influa. Multaj britoj loĝas sur la



La prezidanto (supre) kaj sekretario (sube, staranta) de la Malta Esperanto-Societo, kiujn la familio Lindblom vizitis en novembro.



insulo kaj la turistoj ĉefe konsistas el britoj kaj ili ne rezignas je sia mondlingvo.

La esperantosocieto faris multan reklamon por esperanto fine de majo ĉijare. Ili metis grandan reklamtabulon ĉe la urba portalo, kie la tabulo estis videbla por ĉiu eniranto en la ĉefurbon. Meso en esperanto okazis kaj la poŝto aperigis spe-

LUZERN	
Avgiftoj till 31 dec 1978	
1. Icke medlem i UEA	347 kr
2. Medlem med årsbok	300 kr
3. Medlem med årsbok och «esperanto»	232 kr
4. Make/maka till (1)	242 kr
5. Make/maka till (2) eller (3)	210 kr
6. Ungdom t o m 20 år	105 kr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	173 kr
8. Synskadad	139 kr

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester Andrén. Regementsgatan 27 d. 217 53 Malmö (tel. 040-6 52 09).
Betalingar till postgiro 14 74 29-5. Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö).

cialan poŝtstampon.

La maltanoj estas ĉarmaj homoj kaj la insulo estas vere vidinda. Insulo de longa kultura erao kun multaj vidindaj konstruaĵoj. Tio ankaŭ validas por la insuleto norde de la ĉefa insulo, nome Gozo. Turistoj, kiuj nur vizitas sudajn landojn por diboĉi, prefere elektu alian celon!
Rom

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

YXHULT GRUPPEN

Jerome K. Jerome: Ne sekvu konsilojn!

Mi kredas, ke la viro ankoraŭ ne scias, kio okazis al li. Mi ne povis turniĝi por rigardi, kiel estas kun li. Nur la komencon mi vidis. Duonvoje suben en la deklivo mi aŭdis policanon krei post mi, verŝajne pro troa rapideco. Duonan mejlon antaŭ Chesham ni renkontis lernantinojn el iu knabina lernejo, ili iris pare unu post la alia. Mi vetas, ke la knabinoj ankoraŭ hodiaŭ rakontas, kion ili tiam travivis. La maljunulino certe kolektadis ilin dum tuta horo.

En Chesham estis foiro kaj mi certas, ke Chesham neniam antaŭe vidis tiel viglan foiran tagon. Tra la urbo ni veturis certe je tridek mejloj po horo. Neniam antaŭe mi vidis tiom da homoj en Chesham. Kutime ĝi estas dormema nesto. Mejlon post Chesham montriĝis poŝta vagono. Mi jam ne plu atentis tion. Mi tiel kutimiĝis, ke ne gravis, kio okazas, mi estis nur scivolema. Kiam la poŝta vagono estis nur kelkajn metrojn for la ĉevaleto subite haltis, tiel ke mi falis de la sidloko kaj troviĝis en la ĉaro. El la ĉaro mi ne povis veni, la sidilo kuŝis sur mi. Mi vidis nur la ĉielon kaj jen kaj jen la kapon de la ĉevaleto, kiam ĝi leviĝis sur la poŝtaj kruroj. Sed mi povis aŭdi la rimarkojn de la postiljono kaj mi rimarkis, ke ankaŭ li malĝuis la situacion.

'Forigu tiun ĉi diablan cirkon

for de la vojo!' li kriis. Se la viro nur estus malferminta la okulojn li vidus, ke mi estis senpova. Mi aŭdis, kiel liaj ĉevaloj leviĝas kaj hufobatas. Ĉevaloj ja estas tiaj: se ili vidas frenezulon, tiam ili ĉiuj frenezemas.

'Tiru ĝin hejmen kaj ligu ĝin al la trogo,' kriis la postiljono.

Poste spasma kaptis maljunan virinon kaj ŝi ekridis kiel hieno. Tio reinstigis la ĉevaleton kaj ni kuris, kiel mi povis prijuĝi laŭ la nuboj, galope iajn kvar mejlojn. Poste ĝi ekpensis, ke taŭgus trasalti barilon kaj ĉar ĝi imagis al si, ke la ĉaro ĝenus ĝin je la salto, ĝi komencis disbati ĝin en erojn. Neniam mi kredis, ke eblas disigi la ĉaron en tiom da pecoj. Kiam ĝi disrompis ĉion, escepte de kotŝirmilo kaj duona rado, ĝi ekkuregis pluen. Mi restis inter la rompitaĵoj kaj fine iom respiris. Iam malfrue en la posttagmezo la ĉevaleto venis hejmen kaj mi estis kontenta, kiam mi sukcesis vendi ĝin por kvin pundoj. Dek pundojn mi devis alpagi por ripari ĉion.

Ankoraŭ hodiaŭ la homoj pikas min pro la ĉevaleto kaj nia abstinencula societo pretiĝis eĉ predikon pri ĝi. Tiel okazas, kiam oni sekvas konsilojn.»

Mi komprenis lian ĉagrenon kaj simpatiis kun li. Ankaŭ mi devis suferi pro similaj konsiloj. Mi havas inter la konatuloj aĝiotiston, kiun mi jen kaj jen

renkontas. Unu el liaj plej fervoraj deziroj estas riĉiĝi min. Sur strato Threadneedle li kaptis min. «Ho, ĝuste vin mi serĉadas. Ni kreu malgrandan akcian societon kun limigita respondeco». Li ĉiam fondadas malgrandan a.s.k.l.r. kaj por ĉiu centoj da pundoj, kiun vi enmetos en ĝin, vi ricevos milon. Se mi estus aliĝinta al ĉiuj liaj malgrandaj a.s.k.l.r. mi valorus hodiaŭ du aŭ tri milionojn da pundoj. Sed mi ne aliĝis al ĉiuj liaj malgrandaj a.s.k.l.r. Nur al unu, antaŭ jaroj, kiam mi ankoraŭ estis pli juna. Kaj mi daŭre estis en ĝi; la amiko certigas, ke la kvoto iam alportos milojn al mi. Sed ĉar mi bezonas kontantojn, mi volonte vendus mian kvoton al ĉiu ajn honestulo, kun rabato, sed kontraŭ kontantoj. — Alia mia konatulo havas amikon, kiu havas kontakton kun bredejo de veterkurĉevaloj. Mi kredas, ke multaj havas tiajn konatulojn. Ili estas tuj antaŭ la vetkuroj tre popularaj, sed tuj post la vetkuroj terure malŝatataj. — Iu tria bonvolulo plej volonte dediĉas sin al la plibonigo de nia manĝo. Iun tagon li alportis ion en iaspeca pakajeto kaj fermis ĝin en mian manon kun mieno, laŭ kiu li estis forprenonta la pezon de ĉiuj zorgoj for de miaj ŝultroj.

«Malfermu kaj rigardu!» li diris per voĉo de fabela sorĉisto.

Mi malfermis kaj rigardis, sed ne fariĝis pli saĝa.

«Tio estas teo.» li klarigis.

«Ho,» mi respondis, «kaj mi kredis, ke estas snuftabako.»

«Nu, se ni pripensas detale, ververe ne estas teo, sed tute speciala teo. Eltrinku taseton kaj neniam vi trinkos alispecan teon.»

Li pravis. Mi eltrinkis taseton kaj mi ne plu havis deziron iam ajn trinki teon. Mi neniam alian deziris ol iri al soleca loko kaj morti. Post unu semajno li vizitis min.

«Ĉu vi rememoras la teon, kiun mi donis al vi?»

«Kiel mi ne faru,» mi respondis. «Mi neniel povas liberiĝi de tiu gusto.»

«Ĉu ĝi damaĝis vin?» li demandis.

«Ne tro, mi jam trasuferis tion.»

Mi vidis, ke li enpensiĝis. «Tiam vi prave diris,» li daŭrigis, «estis snuftabako, speciala speco, oni sendis ĝin al mi rekte el Hindio.»

«Bele ne estis, mi devas diri.» «Estis stulta interŝanĝo, laŭ mia kulpo,» li daŭrigis, «mi certe interŝanĝis la pakajetojn.»

«Nu, ja, homo povas erari,

sed kun mi vi neniam plu eraros.» Ni ĉiuj volonte donas konsilojn. Iam mi havis la honoron servi maljunan viron, kies profesio estis doni jurajn konsilojn, vere bonegajn konsilojn. Kiel plejparto el la homoj, kiuj konas juron, li tre malmulte utiligis sian jurkonon. Iam mi aŭdis lin diri al pasia procesemulo:

«Se vagabondo haltigus min surstrate kaj postulus mian ĉenhorloĝon, mi defendus min kaj ne donus ĝin al li. Se li dirus: 'Do mi perforte prenos ĝin,' mi dirus al li, eĉ se mi estas maljuna: 'Nur venu kaj prenu ĝin, se vi povas.' Sed se li dirus al mi: 'Bone, mi do vokos vin al juĝejo kaj devigos vin doni ĝin,' mi tuj prenos ĝin el la poŝto, metus en lian manon kaj petus lin ne plu perdi tempon kun mi. Kredu al mi, mi liberiĝus malmultekoste.»

Sed tamen tiu maljuna sinjoro iris al juĝejo kun sia najbaro, nome pro mortinta papago, kiun neniu en la mondo taksis eĉ unu ŝilingon valora, dum li postulis minimume cent pundojn por ĝi.

«Mi scias, ke estas stulte. Mi ne havas certan pruvon, ke lia kato kulpas, sed li pagu, ĉar li diris al mi, ke mi estas malbenita paragrafulo, aŭ oni pendigu min.»

Ni ĉiuj scias, kiel oni faras pudingon. Ni ne asertas, ke ni kapablas fari ĝin. Tio ne gravas. Nia tasko estas kritiki la kuiristaron. Ni alprenas la rajton kritiki aron da aferoj, kiujn ni mem ne faras. Ni estas ĉiuj kritikistoj. Mi juĝas vin laŭ mia mezuro, leganto, vi verŝajne laŭ via. Sed ne rakontu tion al mi. Tion mi ne volas scii. Kalumnio min malantaŭ la dorso, tion mi preferas. Jam plurajn fojojn mi prelegis en salono, kiu estis tiel konstruita, ke mi devis eniri tra la sama pordo kiel la aŭskultantoj. Kaj ĉiun fojon mi aŭdis iun flustri al la najbaro: «Atentu, li estas tuj post vi.» Ĉiun fojon mi estis dankema al la flustrinto.

En bohemea klubo mi iam trinkis kafon kun verkisto, larĝŝultra, fortika sinjoro. Alia membro de la klubo alsidiĝis kaj diris al la amiko: «Mi jus finlegis vian lastan libron kaj mi senkaŝe diros al vi, kion mi opinias pri ĝi.» La verkisto glate eljetis: «Mi avertas vin, — se vi faros tion, mi rompos vian kapon.»

La liberan tempon ni plej ofte foruzas pikante unu la alian. Kiam ni fanfarone iradas ĉirkaŭe kun alten levita nazo — estas vera miraklo, ke ni ne iun tagon renversigas de tiu ĉi nia malgranda tero en la universo.

Tradukis MM

Redan betalt?

Din medlemsavgift till UEA, alltså. Inte? Då är det hög tid att du gör det!

Avgiften för MJ, medlem med årsbok utan tidning är 46,— skr; avgift för MA, medlem med tidning och årsbok är 115,— skr.

Tillägg för den som vill vara med i Societo Zamenhof och vill stödja UEA ekonomiskt är 230,— skr.

Du betalar till postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.